

ESPERANTYSTA
POLSKI
POLA ESPERANTISTO

Kuneldonantoj:

S-oj: Prof. D-ro Odo Bujwid, D-ro L. Chybczyński, M. Czerwiński, Jan Günther,
D-ro A. Nauman.

Protektoroj=subtenantoj:

S-oj: L. Bogusławski, S. Essigman, A. Grabowski, Kielca Soc. Esp., J. Loth,
R. Maske, A. Zakrzewski, D-ro Leon Zamenhof.

Helpantoj:

S-oj: J. Chankowski, D-ro Gelibter, B. Jabłkowski, A. Koziara, B. Radzi-
miński, D-ro W. Róbin, B. Szczepankiewicz, J. Tejchfeld, R. Vogel, H. Wie-
rzechowski, D-ro A. Zamenhof, F. Zamenhof.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Varsovio, Śopena 8, telefono 160-24.

Prezo 20 kop.

„Esperantista Polski“

W ROKU 1914

będzie wychodzić regularnie co miesiąc w 16-stronicowej objętości o urozmaiconym programie.

Roczna prenumerata z „Dodatkiem literackim“ 2 rb. 50 k. z przesyłką pocztową.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio: Warszawa (Polujo) Ŝopena 8.

„Pola Esperantisto“

EN 1914 JARO

aperados ĉiumonate en 16 paĝa amplekso kun diversigita programo kaj „Literatura Aldono“

Jar-abono kun la „Literatura Aldono“ rb. 2.50 = \$ 2.65 kun poŝta trasendo.

Cena ogłoszeń

na okładce:

Cała II strona, 4-o szpaltowa . . . rb. 32.—
„ III i IV po „ 25.—
Wiersz petitowy, jednoszpaltowy
na II-ej stronie . . . rb. —.20
„ jak wyżej na III i IV stronie „ —.15

Najmniejsze ogłoszenie 1 rb.

Od ogłoszeń stałych lub kilkakrotnych ustępuje się odpowiedni rabat.

Prezo de anoncoj

sur kovrilo:

Plena II-a paĝo, 4-kolona rb. 35.—
„ III k. IV paĝoj po „ 22.—
Unu linio petita, unukolona, sur II paĝo „ —.20
„ „ „ sur III k. IV paĝoj . „ —.15

Plej malgranda anonco kostas 1 rb.

De konstantaj aŭ kelkfojaj anoncoj estas de kalkulata konvena rabato.

Sensacio en esp. literaturo!

EL PARNASO DE POPOLOJ

Jubiĉa libro de esperanta poezio kaj de ĝia Majstro, s-ro ANTONI GRABOWSKI.

Ĝi estas 240 paĝa, bela volumo kaj enhavas tre abundan kaj plenan kolekton de poemoj originalaj kaj majstre tradukitaj dum 25 jara literatura agado de s-ro Grabowski —
el 30 lingvoj.

Ĝi estas vera antologio de tutmonda poezio.

La unikan libron devas posedi ĉiu amanto de belo, poezio, ĉiu organizanto de esp. koncertoj, ĉiu deklamanto aŭ kantisto kaj fine ĉiu esp. grupo.

La prezo de la libro estas:

1,00 Sm.; kun sendelspezoj — 1,15 Sm.; luksa eldono sur plej bela papere kun portreto de la aŭtoro — 2,00 Sm. kun trasendo — 2,25 Sm.

La libro estas senpage aldonata al ĉiu abonanto de „Pola Esp.“, kies jarabono kostas 2,65 Sm.

Rapidu do aboni „Polan Esp.“ aŭ mendi la libron aparte. — La mendojn oni sendu al Red. Pola Esp. Varsovio, str. Ŝopena № 8.

X-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo — 1914.

L A M O V A D O

L'Esperantiste Français

Oficiala Organo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

Publikigas informojn pri la organizado de la X-a Kongreso, la Pariza vivado kaj aliaj plej interesaj aferoj.

Aperinte, en la daŭro de kvin jaroj laŭvice, sur 4, 9, 12, 16, 20 kaj nune 24 paĝoj (granda formato: 23×33, kun ilustraĵoj) la **Movado** estas la plej granda el ĉiuj esperantistaj gazetoj, laŭ la vidpunkto materiala kaj unu el la ĉefaj plej interesaj laŭ vidpunkto morala.

Ĉiuj gesamideanoj, precipe la estontaj gekongresanoj, devus do legi ĝin.


Jara abono: Francujo fr. 2.50, Alilando fr. 3.20 (Sm. 1300).

Sendo de la lasta numero kontraŭ unu internacia respondkupono.


61 Boulevard St. Marcel, Paris 13-a.

POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Decembro 1913

WARSZAWA—VARSOVIO

Jaro VIII — Nro 12 (80)

AL NIAJ LEGANTOJ NI SENDAS KORAJN KRISTNASKAJN BONDEZIROJN.

Karaj Legantoj!

Administracio de Pola Esp. afable petas Vin:

1-e: **Senprokraste** renovigi Vian abonon por 1914 j., sendante abonpagon (rb. 2,50 = 2,65 Sm.) al la Administracio laŭ la adreso:

Varsovio, Ŝopena 8.

2-e: Varbi novajn abonantojn;

3-e: Uzi la servojn de la Administracio, kiu liveras ĉiujn esperantajn kaj polajn librojn kaj peras aboni ĉiujn esperantajn kaj polajn gazetojn;

4-e: Malgrandajn sumojn — ĝis 1 rb. 50 kop. — sendi per ruslandaj poŝt-markoj;

5-e: Komuniki ŝanĝojn de l' adreso kaj ĝenerale skribi la adresojn tre legeble.

Redakcio de P. E. afable petas siajn amikojn:

1-e: Sendi mallongajn komunikojn pri esperanta movado en provinco, pri esperantaj servoj aŭ okazintaĵoj;

2-e: Laŭeble sendi konvenan materialon por la gazeto, ĉu nacilingve, ĉu tradukite;

3-e: Uzi la servojn de la Redakcio, kiu:

— faras stilajn korektojn de esperantaj manuskriptoj,

— peras kaj prizorgas eldonandon de diversaj esperantaj libroj, broŝuroj, poŝt-kartoj kaj aliaj esperantaĵoj.

Varsovio, Ŝopena 8.

Ĉe fino de la jaro.

Forpasas la jaro. Ĉiu rigardas post sin, en estintecon, kaj sumigas rezultojn de sia agado. Nevole, ŝtele venas la demando: kion donis al ni ĝi, *la dektria*? Kiajn ĝojojn ĝi alportis al ni, per kio ĝi nin ĉagrenigis? Fatale jarĉi! Same, kiel jarcenton antaŭe, ĝi signis la vojon de si trapasitan, per sanganta rivero, ĝi elgravuris sian trapason en homara historio per bruligitaj vilaĝoj, inter kiuj kuŝas neentombigitaj kadavroj. El fumantaj ruinaĵoj, el sangvaporigo sin levas renkonte al juna *dekkvara* fantomoj de homa mizero.

Reĝo-malsato konvulsie elrampas kaj grinčas kontente la dentojn. En neĝokovriganta kamparo vagas bandoj de senhejmaj, kadukaj mizeruloj, de *batalintoj*!

Fatala dektria! Nenia jaro povas ĝin egali per abundeco de hontindaj politikaj skandaloj, de nekredindaj, pro sia sovaĝeco, procesoj, fine per multego da mortoj. Ĉiu nacio havis lan dolorigan perdon, lan morton de grava aganto. Nia Esperantujo ne ankoraŭ demetis funebran krepon pro morto de du viroj de *Ago—Carlo Bourlet kaj Abato Richardson*. Multajn batalantojn elŝiris la morto el vicoj de nia paca armeo. Ili dormu eternal

Simile al monta rivero fluas la vivo. Ĝi glatigas grataĵojn sur sia fundo kaj forportas en forgeson dolorojn kaj ĉagrenojn. Malgraŭ niaj perdoj ni ne malkuraĝigis, sed, enteriginte mortintojn, ni revenis al nia laboro. Forpasis jam tempo de hezito, necerteco kaj seniluziigoj. Nia celo kaj vojo plene klarigis kaj ni kun fluo de viva rivero rapidas antaŭen, ĉar nia afero eniĝis en vivon. Foliumante jurnalojn ni ĉiupaŝe renkontas rezultojn de nia laboro.

Ĉiu tago alportas al ni novan venkon. Inter gravaj okazintaĵoj de forpasinta jaro, sendube, la ĉefan lokon okupas nia IX Kongreso.

Ĝi estis bela pruvo de nia maturigo. Malgraŭ malmulte da tempo kaj malfavoraj cirkonstancoj ĝi bone sukcesis kaj ne trompis nian esperon. En la kroniko ofte estis cititaj faktoj, ke multaj lernejoj enkondukis Esperanton, kiel nedevigan objekton, en sian programon. Ĉe la societoj estas gvidataj sufiĉe efike kursoj. En ekspozicioj ĉiam Esperantofako okupas konvenan lokon. Tiel ŝajne malproksiman revon, kiel demandon priesperanta universitato, oni jam traktas tute serioze. Nia literaturo pliriĉigis je multaj tradukoj, in-

ter kiuj estas citinda traduko de la Nova Testamento, eldonita de Brita Biblia Societo.

La originala literaturo ankaŭ akiris kelkajn novajn teatraĵojn kaj rakontojn eĉ la romanon, duan laŭ vico de la sama aŭtoro, s-ro Luyken. Vicoj de niaj malamikoj kaj apatiaj indiferentuloj, kiuj estas pli danĝeraj ol malamikoj, konstante pli kaj pli rariĝas. Jam tre ofte oni povas aŭdi dum diversaj kongresoj paroladon favoran por nia movado. Kaj la gazetaro, tiu barometro de publika opinio, sufiĉe ofte enpresigas laŭdajn kaj propagandajn artikolojn.

Nia perioda preso ankaŭ pligrandigis dank' al apero de kelkaj novaj jurnaloj, kiel propagande-naciaj („Ukraina Stelo“, „Aina Socialisto“ k. a.) kaj ankaŭ specialaj („Espero Teozofia“). Multaj naciaj kongresoj havas bonan sukceson kaj efike propagandas Esperanton kaj preparolas rimedojn de ĝia disvastigo en sia lando. Kaj jen kiel rezulton de sukcesa agado ni legas pri intencata konstruo de Esperanto-Monumento...

Mi ne plu citos niajn eksterajn almitojn, sed mi diros kelkajn vortojn pri nia interna organizo. Certe, plej grava decido de la IX estas la decido pri Unuiĝo de la societoj. Laŭ mia opinio ĉefa merito de tiu unuiĝo estas tia, ke ĝi donos eblecon al niaj „oficialaj“ institucioj liberiĝi de privata subvencio kaj tio forigos multajn, nedezirindajn konfliktojn.

Kaj krom tio tiu unuiĝo kreos fortan ligilon inter dissemnitaj niaj postenoj en la homara maro. Praktika agado de U. E. A. estas tiel videbla kaj ĝia graveco jam estas pruvita per mono-oteroj de esperantianoj por garantia kapitalo, ke mi kuraĝas nenion aldoni. Ĝi estas unu el unuaj, se ne sola nia institucio, klu jam vivas memstare. Elekto de Paris'o, kiel ubro de X Kongreso tute ne estas tiel danĝera por nia afero, kiel tion pensas kelkaj pesimistoj. Oni timas, ke nia Kongreso *perdigos* en granda Paris kaj ni nin mem mokigos.

Sed oni forgesas, ke ni venos multenombre, jam sole pro tio, ke multajn altiros Paris mem kaj ke ni estas bone kunigitaj. Ĉu ne pli bone estus labori por bona sukceso de la X, sed ne antaŭdiri ĝian fiaskon?..

Resumante nian forton, niajn almitojn sur kultura kampo, oni povas konkludi, ke nia afero marŝas antaŭen, malgraŭ niaj perdoj.

La gvidantoj mortas, sed la afero ne estingigas; tio montras, ke ni estas sur bona vojo. Estus naive, memkompreneble, pensi, ke ni ne plu havas ventegojn, ke ni ne plu batalos. La vivo estas batalo.

Sed ni ĝin ne timu, ĉar „ni estas jam bone harditaj“.

En la batalo ni plifortigos; ĉiu nova

perdo, aŭ eĉ malsukceso donos al ni sperton montrus al ni rimedon per kiu ni tute forigos la darilojn, starantaj sur vojo de homara interamikigo. Se iuj falos en neegala batalo kun homa superstiĉo, ne ellasante noblan parolan armilon — ne timu pri ili: ne morto, sed ili estas venkintoj. Gloro al venkintoj!

L. Moro.

Lingvo „Cosmopolita.“

S-ro René de Saussure, scienculo, profesoro de Ĝeneva universitato, aliĝis al Esperanto en jaro 1907. Preskaŭ de la unua momento li okupis sin pri reformo de Esperanto. Proksimume ĉiun duonjaron aperas nova projekto, propagandaj ĵurnaloj, libroj, skribitaj en la nova lingvo, — aŭ s-ro de S. invitas reprezentantojn de aliaj lingvoprojektoj priparoli kun li diversajn reformojn.

La intencoj de s-ro de S. estas certe plene laŭdindaj. Lia celo estas kunigi sub unu standardo ĉiujn partianojn de L.I., — celo inda de penoj kaj laboroj. Oni eĉ devas admiri obstinecon kaj fervorecon, kun kiuj li laboras: kiam unu projekto ne sukcesas kunigi kontraŭulojn, li tuj pretigas alian, esperante, ke li fine trafos tiun, kiu alportos universan interkonsenton. Ekzistas jam tuta serio da projektoj de s-ro de S.

Nur unu cirkonstanco estas iom stranga. S-ro de S. estas do Esperantista Akademiano, prezidanto de esp. Societo, mi eĉ ekscias, ke li estis prezidanto de la Berna esp. kongreso. Kion do povas pensi la anoj de tiu ĉi solena esperantista manifestacia festo, kiam ili vidos ke ilia prezidanto, kelkaj tagoj poste, publikigas projekton de reformo de Esperanto. Tio certe ne pligrandigos konfidon al nia lingvo, se ĝiaj ĉefaj reprezentantoj konstante ŝanĝos sian opinion.

Antaŭ la Berna kongreso aperis № 6 de „Lingvo Cosmopolita“, skribita en bona Esperanto, en kiu s-ro de S., analizinte esperantan gramatikon kaj vortaron, ne nur aprobis ilin, sed penis montri ilian superecon kompare kun aliaj projektoj. Ĉiuj trankviliĝis, esperante, ke s-ro de S. jam definitive akceptis nian lingvon. Oni ne rimarkis, ke la aŭtoro prudente lasis ankoraŭ malfermitan pordeton por siaj reformemaj inklinoj: li ne priparolis la demandon pri esperanta alfabeto kaj ortografio! Efektive, tuj post la kongreso aperis

nova kajero de „Lingvo Cosmopolita“ (№ 7-8-9 jam skribita per nova „modifita“ alfabeto!

La ĉefa motivo de tiu ĉi nova propono estas bone konata de la unua momento de apero de Esperanto: ĝi estas la supersignitaj literoj, kiuj, laŭ s-ro de S., „donas al la lingvo skribita aspekton strangan.“ Dua motivo estas tute nova: al s-ro de S. subite ne plaĉis la litero *k*, kiu tiom da jaroj trankvile kaj senbrue ekzistis en Esperanto. Tiu ĉi litero nun ŝajnas al li tro „multepeza“, ĝi „ĝenas la rapidecon de la sribado kaj kripligas ĉiujn latindevenajn vortojn.“ Li do anstataŭis *k* per *c*! Tiu ŝanĝo havis serion da sekvoj: por la sono *o* fariĝas necesa nova litero. S-ro de Saussure elektis la portugalan *ç*, kaj, ĉar tiu ĉi li litero estas ankaŭ netrovebla en multaj eŭropaj presejoj, li toleris uzon de nova digramo: *t+s* por la sono *o*. *) Ankoraŭ nova digramo estas *x+h* por la sono *ŝ* — kaj ni ricevis fine alfabeton, kies kvalitoj estas jenaj:

- a) literoj dividitaj en tri kategoriojn: simplaj, duoblaj, mallongigitaj;
- b) kvin digramoj: *ch, gh, sh, zh, ts*, (*ĉ, ĝ, ŝ, ĵ, c*);
- c) kiel sekvo, speciala signo por montri, ke *h* ne estas nur helpa litero, sed konservas sian propran sonon;
- d) du novaj signitaj literoj: *û* (*ŭ*), *ç* (*c*).
- e) *k* senigita de tiu sono, kiun ĝi havas en ĉiuj multaj lingvoj, en kiuj ĝi ekzistas, kaj alprenita por sono *h*, kiun ĝi havas en nenia lingvo;

*) S-ro de S. eble ne scias, ke *t+s* ne estas *c*: en lingvoj slavaj ekzistas tre sentebla diferenco inter la simpla *c* kaj *t+s* (oceniĵ—otškoĉiĵ, oĉenka—otstavka, oĉet—odsetka...) Same *ĝ* ne estas *d+j* (dżuma—drzwi, dźgać—drzewo), nek *ĉ* ne estas *t+s* (czy—trzy, czego—trzeba...).

f) dufoje po 2 signoj por unu sono: *ŝ* ŝa
w, *) *ç* aŭ *ts*;

g) Ŝanĝo de 42 radikoj por eviti digramojn, kiujn do, evidente, eĉ ilia defendanto ne tre ŝatas (*cielo, gardeno, ingeniero, jaluza, jaŭdo, jeti, jurnalo, pregi, stopo, voco*..);

Malgraŭ tio, la nove fabrikita alfabeto, — kio estas jam vere mirinda — eĉ ne atingas tiujn celojn, por kiuj ĝi estis kreita, ĉar:

a) la forigo de supersignitaj literoj estas nur parta, ĉar anstataŭ esperantan *o* kun supra signo, ni havas *c* kon suba signo, kaj en *ŝ* nur la signeto ŝanĝis sian formon;

b) *k* restis ankaŭ kun ŝanĝita signifo;

c) fine, se la celo de la reformo estis doni „*aspecton de la lingvo scribata pli conforman al kutimaj aspectoj de modernaj tekstoj*“, tio estas nur parte atingita. Eĉ se anstataŭ *modernaj* ni diros *latinlingvaj*, ni vidos, ke, ekzemple, en franca lingvo *c* ne ĉiam signifas *c* kaj vortoj kiel *cedi, certa, ĉielo, ĉesi* havas pli francan aspekton ol *chielo, chesi*, *çerta*... ankaŭ: *zhaluza, zhaŭdo, zheti, zhuri*... estas malpli similaj al francaj: *jalous, jeudi, jeter, jurer*... ol esperantaj: *jaluza, jaŭdo, jeti, juri*; ankaŭ fremdaj estas por Francoj: *teksto, eczemplo, eczisto, tacso* (rimarku, ke Poloj estus inklinaj legi *edemplo, ecisto*..., Hungaroj: *téclo, taco*...), *cvanto, celcaj, cvalito, cvar*... skribitaj france per *qu* (quantité, quelque), aŭ *kimero, kaoso kimio*... skribitaj france per *ch*...

Por aliaj naciaĵoj, ne latinlingvanoj, Germanoj, Rusoj, Poloj, Hungaroj k.c. k.c. la reformo estas jam rekte kontraŭa al la „*kutima aspecto*“ de iliaj lingvoj.

S-ro de S. eble ne scias, ke la litero *k* estas uzata en ĉiuj tiuj ĉi lingvoj ne nur en iliaj propraj vortoj (*verco — Werk, cnabo — Knabe*), sed eĉ en latindevenaj.

En slavaj lingvoj oni skribas: *kontenta, Akademio, konkludi, konjako, kafo, katoliko, kapitalo, kvadrato, kasko, kalkuli, kalsono, katedro, kanalo, kapelo, kanoniko* k.c.,

*) Feliĉe, s-ro de S. forĝis la reformon, kiun li proponis en sia „*Elementala gramatiko de la lingvo internacia di Antido*“, en kiu 4 literoj havis ŝanĝantajn signifojn kaj estis „*aŭ diftongoi, aŭ duondiftongoi, aŭ nediftongoi*“ laŭ sia loko en vorto: „*la formoi i e u diftongiĝas almaldekstre e la formoi y e w diftongiĝas alddekstre*“. Tio donas 12 „*interkombinuroi de vokal-konsonantoi*“ kies klarigo postulas 96 „*exemploj*“ (p. 37-38). Ankaŭ li forĝis pri absurdajo *x* (ks, gz).

kiel en Esperanto (el 157 vortoj de tiu ĉi kategorio, cititaj de s-ro de S., 98 ekzistas en pola lingvo kun ortografio identa al esperanta).

Mi jam ne parolas pri propraj nomoj, ĉar certe neniam Germanoj konsentos skribi: *Cant, Kaufman, Cönigsberg, Bismarcc*, — nek Poloj: *Crashevsci, Miŝcievich* aŭ *Mitscievich, Grabovsci, Crucovsci*... — nek Rusoj: *Costomarov, Mosco, Crilov, Crim*..., — nek Svedoj: *Cricorts, Stoccholm*... k.c.

Ni estus do devigitaj konservi en propraj nomoj *k, c* kun iliaj komuneŭropaj kaj esperantaj sonoj. Nova kaoso!

S-ro R. de Saussure, por malgrandigi la gravecon de sia reformo, diras, ke „*la valoro de iu ajn lingvo konsistas esence el (en?) la kvalitoj de la parolata lingvo, ne de la lingvo scribata*...“ Tio estas vera por lingvoj naciaj, sed ne por lingvo internacia, kies aplikajoj estos certe multe pli oftaj en lingvo skribata, ol en personaj buŝaj rilatoj.

El ĉiuj ortografiaj demandoj, pri kiuj parolis kaj kiujn tiel facile solvis s-ro de S., nur unu estas certe grava, sed, bedaŭrinde, malfacile solvebla: ĝin ofte priparolis ne nur reformistoj, sed eĉ plej sinceraj Esperantistoj. Ĝi koncernas — supersignitajn literojn.

Mi plene konsentas, ke estus tre feliĉe, se tiuj ĉi literoj povus malaperi el nia alfabeto. Mi eĉ estas certa, ke Zamenhof estas ankaŭ de sama opinio. Se li akceptis ses supersignitajn literojn en sia alfabeto, li faris tion certe ne pro speciala simpatio por tegmentaj signetoj. Li pripensis longe la demandon kaj solvis ĝin, laŭ mia opinio, en eble plej bona maniero.

La demando estas jena:

Unue, nerefuteble estas, ke lingvo internacia devas alpreni alfabeton latinan; *due*, ankaŭ nerefutebla estas la principo de internacieco en ĝia vortaro. Kion do fari kun radikoj, devenantaj de diversaj nelatinaj lingvoj kaj enhavantaj sonojn, ne skribeblajn per latinaj literoj? Por esprimi tiuj ĉi novajn sonojn povas esti 4 metodoj:

- 1) elekti novajn signojn por novaj sonoj.
- 2) preni literojn latinajn, ŝanĝante sonon de kelkaj el ili;
- 3) preni literojn latinajn ŝanĝante iliajn formojn per signetoj;
- 4) preni literojn latinajn, kunmetante unu kun alia.

Teorie — estus plej bona la unua metodo:

nova signo por nova sono evitas ĉiun mal-komprenajon *). Tamen la plejmulto da eŭropaj lingvoj sekvis 3-an kaj 4-an metodon kaj fidela al sia principo de internacieco, Zamenhof sekvis tiun ekzemplon, elektante kompreneble nur la 3-an metodon, ĉar la malgranda praktika maloportuneco de literoj signitaj estas senkompare multe malpli grava ol akcepto de literoj duoblaj aŭ digramoj, en kiuj du literoj perdas sian propran signifon kaj alprenas alian, tute malsimilan. Tiu nelogikaĵo estas kompreneble des pli netolerebla en alfabeto internacia. Tiamaniere la esperanta severe fonetika alfabeto, bazita sur principo „unu litero — unu signo“ estas sola garantio de unueco de elparolado kaj ebligas senesceptan fundamentan regulon: „skribu, kiel oni legas — legu, kiel oni skribas“, ĉiu sono estas markita, ĉiu litero estas legata. Tio estas la sola maniero por liberiĝi de nacilingvaj kutimoj.

Por ke la Francoj ne elparolu *ch* kiel *ŝ*, la Angloj — *ĉ*, la Germanoj kaj Poloj — *h* estas plej bone alpreni specialajn signojn por sonoj *ĉ*, *ŝ*, *h*... Tion faris Esperanto.

S-ro de S. argumentas, ke ĉiuj lingvoj po-

*) L. Bollack en sia „Lingvo Blua“ akceptis renversitan *h* (*q*) por la sono *ĉ*. Oni same povos preni renversitajn *T*, *t* (*L*, *l*) por aliaj sonoj. Por eviti supersignitajn literojn mi antaŭ 15 jaroj proponis: 1) forjeti *ŭ* kaj *j* per regulo: „*u* kaj *i* post aliaj vokaloj farigas konsonantoj“ (bonai=bonaj, ankau=ankaŭ). Tiu ĉi ŝanĝo ne estas kontraŭa al la fundamenta principo, ĉar la sonoj de *u* kaj *i* restis nur mallongigitaj per antaŭiranta pli longa vokalo; 2) tiam ni povas preni *j* por *ĵ* (franca signifo); 3) *dj* por *ĝ*; 4) *x* por *h* (greka, rusa, bulgara k.c. metodo); 5) restas do du sonoj (*ŝ*, *ĉ*) kaj du latinaj liberaj literoj (*y*, *q*). Ni povas do preni *y* por *ŝ*, kaj *q* por *ĉ*! Multaj literoj latinaj jam havas diversajn signifojn en diversaj lingvoj (*c* france = *s* aŭ *k*, itale — *ĉ*, pole — *c*; *g* signifas angle *ĝ*, france *j* (gentil), ruse: *b* signifas *v*, *c*—*s*, *e*—*je*, *g*—*d*, *m*—*t*, *n*—*p*, *o* tre ofte *a*, *p*—*r*, *u*—*i*, *x*—*h*, *y*—*u*, *z*—*z*; *ukpa* estas legata *ikra*, *kober*—*kavjor*, *cmpax*—*strah*, *cyn*—*sup*, *cmamucmuka* — *statistika*, *agbokam* — *advokat*, *gokmop*—*doktor*, *Ebpona*—*Jevropa*: ne 2, sed 12 latinaj literoj havas ŝanĝitan signifon kaj, malgraŭ tio, eĉ malgrandaj polaj infanoj, devigitaj jam de la unua tago en lernejoj lerni tiun ĉi alfabeton, ellernas ĝin rapide. Tamen kvankam *xaoso*, *ximero*, *ximio* — estus, mi pensas, facile kompreneblaj, sed *yteli*, *yajni*, *qevalo*, *qielo* — certe ne plaĉus al plejmulto da Esperantistoj. Mi do faris nenian oficialan proponon, kvankam tia reformo ŝajnis al mi teorie pravigebla. Mi simple kutimiĝis al esper. signitaj literoj.

sedas kunmetitajn literojn... sed ĉiujn ankaŭ posedas literojn signitajn, eĉ multe pli ol Esperanto: almenaŭ 11 en franca lingvo; pola fonetiko, kies diverseco estas plej riĉa el ĉiuj, kiujn mi konas, estis devigita preskaŭ duoblige la nombron da latinaj literoj per signoj, kunmetaĵoj (*q*, *ę*, *ć*, *ł*, *ń*, *ś*, *ź*, *ż*, *ch*, *dź*, k.c.).

Laŭ s-ro de S. la principo: „unu sono — unu signo, unu signo — unu sono“ ne malpermesas uzadon de digramoj, ĉar „unu signo ne signifas unu litero“ — kaj „unu digramo estas ankaŭ unu signo“, kiel unu flago dukolora estas do unu signo.

Tio ne estas justa. Unu flago estas unuo en serio da flagoj, sed digramo en serio da literoj prezentas *du unuojn*, ĉar ĉiu el kunmetitaj literoj havas memstaran signifon. Digramo estas do ne nur dulitera, sed dusigna, kaj ĉiu neavertita leganto legos du literojn aparte: estas do necesa speciala klarigo, ke *ch* ne estas *c+h* (kiel *ab* aŭ *ba*) kaj ankaŭ ne signifas *ŝ*, kiel france, nek *h*, kiel germane, pole, — sed *ĉ*!

Ankaŭ ne estas konvinkanta motivo, ke *h* en la nova alfabeto estas konstanta signo de ĉiuj palatsonoĵoj: ĝi krom tio konservas sian propran sonon ne palatan (homo, hundo).

Cetere, por ke similaj sonoj havu similajn signojn, oni bezonus reformi tutan latinan alfabeton!

Ankoraŭ unu rimarko: s-ro de S., kiel matematikisto, amas kalkuli: li kalkulis, ke en la numero de „Lingvo Cosmopolita“, skribita per nova ortografio, malaperis 1487 literoj *k* kaj la nombro da *h* por novaj digramoj pli grandigis nur je 293. La „profito — li diras — estas do tre valora“, ĉar ĉiu komercisto estus ĉiam preta malgajni 293 spesmilojn por gajni 1487. Tiamaniere, grava lingva demando estas decidita el komerca vidpunkto.

Sed ni ankaŭ devas korekti ne sensignifan eraron: 1487 *k* ne estis simple forigitaj, ili estis anstataŭitaj de 1487 *c*. La profito ne estas do 1487 — 293, sed: 1487 (*k*—*c*) — 293 *h* kaj ankoraŭ — *x* (*ĉ*—*c*). Eĉ plej profitema komercisto estus do devigita bone pripensi la aferon.

Ni esperu, ke la propono de s-ro R. de Saussure ne estas ankoraŭ lia lasta vorto en tiu ĉi demando; esperu ankaŭ, ke, jam paciĝinte kun esperanta gramatiko, li paciĝos kun esperanta alfabeto.

Ni kore tion deziras.

Z. Adam.

HENRYK SIENKIEWICZ

Diokles

(Atena fabelo)

Dia Dormo kvietigis Atenojn, kaj en profunda silento oni apenaŭ povus distlugi spiradon de dormanta urbo.

Luna lumado enigis, kvazaŭ en vastan, argentan, dormeman banujon montetojn, Akropolon, templon, olivajn arbarojn, arojn da nigraj cipresoj. Mutigis fontanoj, ekdormis gardistaro ĉe pordegoj, ekdormis la urbo, ekdormis ĉirkaŭaĵo.

En profunda nokto sola Diokles maldormis — kaj, apoginte sian frunton kontraŭ la statuo de Palado, blankiganta en ĝardenoj de Akademio, li ĉirkaŭprenis piedojn de la diino kaj diris:

— Ateno, Ateno! Vi, kiu aperis iam videbla antaŭ okuloj de l' homoj, min aŭskultu! kompatu min! Vi plenumu mian preĝon!

Kaj, depreninte sian frunton de la marmoraj piedoj de Virgulino, li levis okulojn al ŝia vizaĝo, kiun lumigis en ĉi tiu momento pala radio de la luno, sed silento al li respondis.

Eĉ, ĉama en noktaj horoj, delikata blovo de l' maro trankviligis, kaj nenia folio moviĝis sur arboj.

Jen la koro junula pleniĝis je nemezurebla ĉagreno, kaj la ĉagreno larmeruliĝis sur lia bela vizaĝo.

— Vin solan mi volas admiri kaj glorigi super ĉiuj dioj — li petegis — vin, solan mian protektantinon! Sed vi ja mem verŝis en mian animon sopiron kaj deziron, kiu min ĥruligas simile al flamo. Vi ĝin estingu aŭ kontentigu, ho dia! Permesu al mi ekkoni superan Veron. Veron de Vero, animon de tuta mondo, kaj mi ofere donos al ĝi vivon kaj ĉiujn ĝuojn. Mi rezignos de miaj riĉaĵoj, mi redonos junecon, amon, feliĉon, eĉ la gloron, kiun homoj konsideras plej granda bono kaj plej granda beno de dioj.

Kaj li denove batis la frunton kontraŭ marmoro, kaj la preĝo flugis el lia animo simile al la fumo, kiu leviĝas el incensujo. Tuta lia estajo transformiĝis en petegon. Li senkonsciigis ĉe piedoj de la diino, li forgesis, kie li estas, kio okazas kun li, lin ĉirkaŭprenis kvazaŭ duonsonĝo, en kiu restis al li unu sola konscia, kaj samtempe nevenkebla penso, ke je tia preĝo devas veni respondo.

Kaj vere ĝi venis. Branĉoj de olivarboj kaj supraĵoj de la cipresoj subite ekbalanciĝis kaj ekkliniĝis, kvazaŭ ili estus ŝiritaj de nokta vento, kaj murmuro de foliaro ŝanĝiĝis en homan parolon, kiu aŭdiĝis supre, kaj en tuta ĝardeno, kvazaŭ kelkaj homoj vokus samtempe de ĉiuj flankoj:

— Diokles! Diokles!

La junulo ekremis, leviĝis kaj ekrigardis ĉirkaŭen, pensante, ke serĉas lin kamaradoj en la nokto.

Kaj tuj marmora mano apogiĝis sur lia sultro.

— Vi ja min vokis — diris la diino — kaj mi plenumis vian peton, jen mi estas kun vi.

Dia timo levis hararon sur kapo de la junulo, li genufalis kaj ripetadis en timego kaj ekstazo:

— Vi estas kun mi? Vi nekomprenebla, timiga, neklarigebla!...

Sed ŝi ordonis al li leviĝi kaj diris:

... Vi volas ekkoni absolutan Veron, unikan, kiu estas animo de l' mondo kaj senco de ĉiu objekto. Tamen vi sciu, ke neniu el posteuloj de Deukaliono vidis ĝin sen envolvajoj, kiuj ĝin ŝirmas de homaj rigardoj kaj ĝin ŝirmos eterne. Eble tro kare vi pagos vian arogantan deziron, sed pro tio, ke vi juris per propra vivo, mi estas preta al vi helpi, se vi por tio rezignos de riĉeco, potenco, amo kaj gloro, kiu, kiel vi mem diris, estas plej alta beno de dioj.

— Mi rezignas de tuta mondo, kaj eĉ de la suno! — ekkriis entuziasme Diokles.

La cipresoj kaj olivarboj konstante klinadis la kapojn antaŭ potenca filino de Dioso. Ŝajnis, ke la diino primeditas juron de la junulo.

— Sed — diris ŝi post momento — vi tamen ne tuj ĝin ekvidos. Ĉiujare mi vin portos en saman nokton al la Vero, kaj vi deprenos unu ŝirmilon kaj ĝin jetos post vin. Kaj per mia senmorta forto mi faros, ke vi ne mortos, ĝis kiam vi ne deprenos la lastan. Ĉu vi konsentas, Diokles?

— Plenumigu nun kaj ĉiam via volo, saĝa Diino! — respondis la junulo.

Tiam diino, forjetinte marmorajn vestojn, transformiĝis en radiantan kaj malpezan est-

ajon, kiel la lumo, post klo, kaptinte Diokleson je mano, si leviĝis supren kaj flugis rapide tra dia etero, estante mem simila al unu el steloj, kiuj en someraj noktoj ofte traflugas super dormanta Arĥipelago.

Ili flugis rapide, pensosimile, kaj fine haltis en nekonata lando, sur ĉielatinganta monto, pli alta ol Olimpo, Ido, Peliono kaj Oso. Tie sur plej alta supraĵo ekvidis Diokles ion, similantan virinan figuron, ĉirkaŭvolvitan tiel dense per diversaj ŝirmiloj, ke naturaj siaj formoj estis nerekonablaj. Ĉirkaŭ la figuro tremis ia mistera lumo, similanta nenian teran lumon.

— Jen estas la Vero — diris Ateno — vi vidas kiel ĝiaj radioj, malgraŭ la ĉirkaŭvolvajoj ilin penetras kaj lumas. Se ne estus ilia pala rebrilo, kiu falas sur teron kaj kiun kaptas okuloj de saĝuloj, homoj, simile al loĝantoj de Citera lando, vagus en eterna mallumo kaj nokto.

— Ĉielkondukantino — respondis Diokles — se mi ŝirus unuan envolvajon, ĉu la Vero pli lume ekbrilos?

— Vi deŝiru — respondis la diino.

Tiam Diokles kaptis tolan kaj ĝin deŝiris de la Vero. Pli hela lumo tuj ekbrilis en liaj okuloj kaj li, rigardanta radiantan figuron, tute ne rimarkis, ke la ŝirmilo, kiam li ĝin ellasis el manoj, ŝanĝiĝis en blankan cignon kaj flugis for en nebulan malproksimecon.

Kaj longe li staris antaŭ la Vero — denove kvazaŭ en duonsongoj — deŝirita de la vivo, forportita en postmondajn spacojn, malplena de teraj pensoj, kaj el nekonata fonto nekonatan ĉerpante forton kaj en si mem kvietigita.

— Ho helulino! — li diris — ho eternulino! ho animo de la mondo!

Li plenumis donitan al Diino juron. Li estis riĉa, kaj kiam li promenis kun siaj kolegoj ĉu en ĝardenoj de l' Akademio, ĉu sur strato kondukanta al Akropolo, ĉu inter olivarbaroj, inter la urbo kaj haveno, liaj kolegoj sin turnadis al li miroplene kaj riproĉe:

— Diokles! — ili diradis — via patro kolektis nekalkuleblan trezoron kaj vi ja ĉion posedas. Kial do vi ne aranĝas abundajn festenojn, simile al tiuj, kiujn aranĝadis al Atenanoj disimila Alcibades? Kial vi malŝatas festenan paroladon, dancon, per sonoj de

lira kaj citro? Ĉu vi aliĝis al cinikuloj, ke vi tute ne zorgas pri via loĝejo, kaj vi ĝin ne ornamas, kiel decus al vi? Konsideru, ke riĉeco estas ankaŭ donaco de dioj, kiun vi ne rajtas dejeti.

Kaj li restis malriĉa.

Sed en certa nokto dua envolvajo forflugis cignosimile el liaj manoj en malluman spacon kaj Vero de veroj ekbrilis ankoraŭ pli potence antaŭ liaj okuloj.

Li estis bela junulo. Altranguloj atenaj, filozofoj, sofistoj kaj poetoj petegis lin pri lia amikeco, por, rigardante lian belon, alproksimiĝi al belo de eternaj ideoj.

Sed li dejetis iliajn donacojn, penadojn kaj amikecon.

La knabinoj, kiuj kunvenadis sur Stoo kaj Ceramiko, lin ĉirkaŭvolvadis per siaj haroj kaj lin ĉirkaŭdancis per danca rondo. Belegaj, nimfosimilaj heteroj ofte jetadis al liaj piedoj dediĉitajn al Adoniso branĉojn de kopro, aŭ murmuris en lian orelon tra kalikoj de lilioj kaj konvolvuloj voluptajn kaj dolĉajn vortojn, similajn al muziko de arkadiaj flutoj.

Ĉio estis vana!

— Venu — diris al li unufoje la plej bela el atenaj knabinoj, vera enkorpiĝinta flaribdo — miaj okuloj estas similaj al lumantaj steloj, miaj haroj estas kiel aromaj hiacintoj, kaj mia brusto similas bruston de Heleno. Venu, Diokles, ĉar eĉ la dioj en ĉielo neniam scias pli grandan ĝuon, ol amo.

Sed Diokles malgaje ekridetis kaj diris:

— Eĉ tiu birdo, ho disimila, flugis for de mi.

Kaj vere tria cigno forflugis en sorĉa nokto.

Jaroj pasis, kiel nuboj, klujn super Atenoj pelas kolera Boreo vintre de altaj Traciaj montoj al maro. Diokles et junulo fariĝis matura homo. Malofte li partoprenis diskutojn de filozofoj, malofte li parolis pri publikaj aferoj, tamen en la urbo oni admiris lian porolkapablon kaj saĝecon. Kelkafoje civitanoj proponis al li altajn postenojn kaj konatoj kune kun liaj amikoj konsilis al li, ke li prenu direktilon de patruja ŝipo kaj ĝin direktu el malprofundaj kaj akvoturnoj sur trankvilan akvon.

Sed li vidis, kiel en Atenoj disfalis publika ordo, kiel inter malamo kaj partia

batalo pereas amo al patrujo, kiel liaj admono, kvazaŭ dispremitaj semoj, sur ŝtonan kaj sovaĝan falas teron, kaj des pli forte li depuŝis de si potencon, kiun li juris rezigni. Kaj unufoje, kiam popolamaso preskaŭ perforte volis lin starigi sur sia fronto, li diris:

— Ho, Atenanoj! vi mem al vi estas malamikoj. Kiel homo, mi havas por vi larmojn, sed se mi eĉ estus dio, mi ne scius vin regi.

Tamen dum milito, li iris kune kun aliaj defendi sian urbon kaj revenis kovrita per vundoj. Kiam al la plej kuraĝaj oni disdonadis kronojn sur Akropolo, li ne estis inter militistaro kaj li ne permesis elgravuri sian nomon sur kupra tabulo, kiun oni pendigis en templo.

Fine li tute ignoris gloriĝon, kiun li povus ricevi, patroprenante publikajn ludojn.

Jam maljuniĝante li konstruis al si kabanon el salikaj branĉoj apud ŝtonminejoj de Pantelikono kaj, lasinte urbon, li evitis renkonti homojn. Iom post iom oni lin ankaŭ forgesis en Atenoj, kaj kiam li venadis iafoje ĉefplacon por aĉeti oleon kaj panon liaj kontaktoj ne plu lin rekonis.

Kaj longe li vivis sola, altpensa, fermiĝinta en si mem kaj eniĝinta en ian grandegan, kvankam trankvilan kaj kvietan malĝojon.

Pasis ankoraŭ kelkaj Olimpiadoj. La haroj griziĝis sur la kapo de Diokles, lia figuro kliniĝis al tero, okuloj enfalis profunden, kaj maljuneco elsuĉis liajn fortojn. Li vivis per la penso, ke se li baldaŭ forlasos ĉi-tiun mondon, tiam antaŭ tiu forlaso li tamen ekvidos absolutan Veron, eternan fonton de ĉiuj mondaj veraĵoj.

Krom tio li pensis iafoje, ke se Parko ne tuj tranĉos fadenon de lia vivo, tiam li eble revenos en la urbon, al homoj kaj al ili li donos pli multe, ol iam donis Prometeo,

Fine venis granda mistika nokto, en kiu lin kaptis denove la diino en siajn manojn kaj alportinte sur ĉielatingantan monton, ŝi lin starigis antaŭ la Vero.

— Rigardu — ŝi diris — kiel ĝi brilas kaj

lumas. Sed antaŭ ol etendi al ĝi lastafoje la manojn, aŭskultu kion mi diros. La envolvajoj, kiuj dum longaj jaroj flugadis for de vi, simile al cigoj, ili estis iluzioj de via vivo. Se vi domaĝas la lastan, aŭ se timo vian koron plenigas, tiam vi foriru, kiam estas ankoraŭ tempo, kaj mi vin reportos de la montego, ke vi malsupre simile al ĉiuj homoj pasigu reston de via vivo.

— Mi vivon oferis por ĉi sola momento-ekkriis Diokles.

Post tio li proksimiĝis kun forte batanta koro al la brilanta statuo, fermante pro lumo okulojn, li deŝiris per tremantaj manoj lastan ŝirmilon kaj ĝin jetis post sin.

Kaj subite okazis io terura.

En la sama momento kvazaŭ fulmo blindiĝis liajn okulojn — kaj lin ĉirkaŭis tiel forta mallumo, ke kompare kun ĝi plej malluma nokto de Hedeso povus ŝajni hela tago.

Kaj en tiu nokto aŭdiĝis plena de neesprimebla timo kaj senlima doloro voĉo de Diokles.

— Ateno! Ateno! nenio estas sub la ŝirmilo kaj mi nenion vidas!!!

— Sed tiun ekkrion de malespero respondis severaj vortoj de la diino.

— Blindiĝis pro lumo de la vero viaj okuloj kaj malaperis via lasta iluzio, ke mortemulo ĝin povas vidi sen envolvajoj.

Regis silento.

— Vi ĉiam trompas la kredemulojn — ekĝemis Diokles — kaj jen vi trompis min ankaŭ, vi kruela, mensogema diino. Sed se mi neniam vidos absolutan Veron, tiam sendu al mi almenaŭ morton-savonton.

Kaj tiom da superhoma doloro sentiĝis en liaj vortoj, ke ĝi kortuŝis eĉ Atenon.

Kaj metinte manon sur lian malfeliĉan kapon, ŝi diris malsevere:

— Jen, mi ĝin sendas al vi, Diokles, kaj kune kun ĝi la lastan ĝojon, ke kiam la morto vin kvietigos, tiam vi ekvidos la lumon, pro kiu dum vivo blindiĝis viaj okuloj.

La nokto paliĝis, sed tagiĝo leviĝis griza, malvarma, malĝoja. El la nuboj, kolektiĝintaj sur ĉielo, ekfalis abunde blankaj neĝeroj kaj ili kovris mortemajn restaĵojn de Diokles.

el pola lingvo trad. M. Radowski.

JERZY ŻUŁAWSKI.

Eros kaj Psiĥe.

Fragmento el akto II „krepuko de dioj“.

RAKONTO de MALJUNA SKLAVO

Profet' aperis, — li kun amo venas,
kian vi serĉas. Li iras tra valoj,
tra montoj — tie — al Jordan-kristaloj, —
li iras, — mondon kaj homaron benas,
pardonas kulpojn, pekojn, animfalojn, —
post li sin aro simplanima trenas...

Kaj die lia radias frunt' hela,
kie li paŝas — ekfloras lilioj,
li al malĝojaj portas ĝoj-radiojn,
li revivigas mortintojn, ĉiela
ĉirkaŭe regas printemp', floras ĉio:
li — benas ĉion kun ridet', anĝela!

Post li virinoj kaj infanoj iras,
kuras ŝafaro en neĝblanka lano, —
li ilin gvidas al ark-diafano,
kiu ridete el ĉiel' helbrilas,
kvazaŭ la kordojn, tenas lia mano
la korojn, kiuj laŭ vol' sonsimilas...

Nun jam ekzistas nek malbon', ĉagreno!
Neniu estas malgranda, malriĉa,
jam nek malĝoja, kaj nek malfeliĉa;
grandaj mirakloj okazas dum veno
de li, — helklara, radia, amriĉa
al tiuj landoj plenaj da sereno...

Amo-aŭroron li portas al mondoj;
per nom' de l' amo pardonas, konsolas, —
aŭskultas are kiam li parolas
homoj, brutaroj, ventoj, maro-ondoj;
kie li venas ĉio lin adoras, —
Dio! — salutas lin popolo-rondoj.

Al ĉiel' — oni diras-li forportas,
eterne pacon donas kaj vivigas;
kaj kiun koron li benos — purigas,
animo, kiun alvokos, — ne mortas!...
Kristo — nom' lia...

El pola lingvo tradukis

A. S. Stankiewicz.

ANTONO ŜEH.

Religio de la homaro.

En kolektiva animo de la Homaro sin kaŝ-
as sopiro al senfineco — neniu ĉi tion pov-
as nei.

Homo estas filo de l' tero kaj trans la
tero li rigardas.

Kiel arbo, prenanta vivsukojn el la tero
kaj etendanta branĉojn al la ĉielo — kiel la
floro, naskiĝinta sur sino de l' tero kaj flor-
kalikon levanta al suno — same homa animo
ion pli grandan aspiras ol tio, kion al ĝi sent-
oj ĝiaj liveras — ol tio, kion la mondo donas,
aŭ kion ĝi estas kapabla doni — la animo so-
piras pri io altpensa, pli bela kaj pli sublima.

Kaj nenio ĉi tie la homon kontentigi povas—

Nek tio, kion li vidas kaj posedas ĉi tie—
Nek la feliĉo, kiun li ĉi tie povas akiri —
Nek la kanto pri ekzisto-ĝojo el vivo kaj
ekzisto, kiun ĉio kantas ĉirkaŭ li.

La spirito de homo ĉiam sopiras —

Sur lia frunto kuŝas malĝojo kaj enpens-
iĝo kaj aspiro al io — pli granda — alla.

Kaj estas pli mirinde —

Ju pli riĉa estas la naturo, ju pli bela ĝi
estas — ju pli multe allogas ĝi homon per sia
ornamo — ju en pli ĉarmaj sin vestas kolor-
oj — ju per pli melodika kanto lin lulas —

Des pli forta fariĝas sopiro de homa animo—

ne ĉiu volis kredi. La homoj kurante unu al la alia ripetadis la famon, ke la profesiaj unuigoj aĉetis por 50000 sm. nutraĵon en pro-granda kooperativa magazeno en Manchester por Irlandaj mizeruloj! — Ĉu ĝi estas ebla? — kiel, kion? — Ĉu ni ĝisvivos tion? — Niaj infanoj mortos de malsato antaŭ ol venos ĉi tiu bonfarajo. Post kelke de horoj trakuris nova fomo. La ŝipo kun nutraĵo jam fornaĝis, morgaŭ ĝi estos en Dublin!

Ho ĝojo!

Ni transportu nin pense en Manchester, kie ariĝas grandiozaj konstruaĵoj de la kooperativa pogranda magazeno, nomata „C. W. S.“

Unu septempran tagon reprezentanto de la laboristaj unuigoj turnis sin al la kooperativa pograndedejo: „Ŝarĝu ŝipon per nutraĵoj por niaj malsataj fratoj en Irlando. Ni havas monon, sed neniu kapitalisma komercegisto plenumos ĉi tion“. Ekridetis la reprezentanto de la magazeno: „All right. Ni faros ĉion fareblan por satigi niajn malsatajn frat-ojn en Irlando“. — „Sinjoro, tie la homoj mortas de malsato. La ŝipo ne devas malfruiĝi eĉ unu tagon. Hodiaŭ estas merkredo, ne pli malfrue ol la sabaton matene la nutraĵo devas esti en Dublin“. — „All right!“

La saman tagon je la kvina tagmeze tra ĉiuj konstruaĵoj de la kooperativa pograndedejo traflugis la ordo: En 30 horojn estu pretigitaj 1850 pakajojn, 118 korboj da koloniaj komercaĵoj, 1021 grandajn kaj 12250 malgrandajn sakojn da terpomoj, entute 259 tunoj (259000 kg.) da nutraĵo. Neniu privata komercejo povas plenumi tiun laboregon en tiu malgranda tempo, povis deviĝi je ĝi nur la laborista institucio plena de profunda amo al ĉiuj bezonoj de la laborista popolo kaj de la plej alta kompato al malsataj kunfratoj. La ordonon oni akceptis ĝoje kaj decidis maldormi, por ke la ŝipo estu preta ĝustatempe. Oni jetis sin al laboro. Aŭtomobiloj de la magazeno brue kaj muĝe diskuriĝis al Middleton por konfitajoj de tiea kooperativa fabrikejo, al Londono por teo, al provizejoj kaj bi-enoj por terpomoj... Vespere multaj laboristoj iris hejmen, diri, ke ili ne venos dormi, ĉar en la pograndedejo bolos grandioza libervola laboro por bono de kunfratoj laboristoj. Matene la laboro ekbolis per duobligita forto kaj daŭris seninterrompe. La direkcio senpage liveris al laborantoj maten-, tag-, vesper-, kaj noktmanĝon. Vendredon matene grandaj tabuloj sur ĉiuj pordoj de la pograndedejo

anoncis: „Hodiaŭ la ŝipo kun nutraĵo fornaĝos“. La sciigo fulme disfamiĝis en ĉiuj anglaj gazetoj. Kunveturis ĵurnalistoj. Ĉiuj, sendepende de siaj konvinkoj, estis profunde kortuŝitaj de la potenca atesto de la popola solidareco. Ĝi estas grava historia okazintaĵo en la disvolviĝo de angla kooperativismo kaj profesiaj unuigoj — oni diris. La ŝipo foriris al doko de Manchester. Amasoj da laboristoj grandare eliĝis el fabrikoj sur la bordon, adiaŭante la bonfarantan ŝipon per bondeziroj:

— Feliĉan vojon!

La vidaĵo estis kortuŝanta ĝislarme.

La maro inter Anglujo kaj Irlando estas terure malkvietema kaj danĝera. Ĉiujare tie dronas kelke da ŝipoj. Nunfoje ankaŭ okazis nokto nebula kaj infere nigra kaj la ŝipo devis furioze rapidi. Se ĝi estus ordinara ŝipo, ĝi rifuĝus en ia ajn haveno kaj atendus ĝis pasos la danĝera nokto, sed ĝi estas ŝipo mirakla, portanta al malsataj laboristoj nutraĵon el la kooperativa magazeno. Ĝi do iris la tutan nokton malgraŭ la nebulo. Fine ektagiĝis. Oni estis proksimiĝantaj al Dublin ornamis bele la ŝipon per standardoj de Anglujo kaj flagoj de la kooperativo. Sur la plej alta masto flagris granda standardo „C.W.S.“ Sed nur tiam, kiam la ŝipo estis enironta en la havenon la tuta ŝipanaro kaj reprezentantoj de la kooperativo eksentis tremigan kortuŝon. Ĉie, kien povis atingi la okuloj, la bordo estis kovrita per miloj da laboristoj. Ili de la tagiĝo atendis la savan ŝipon. Kiam ĝi aperis sur la horizonto, ekkrio de feliĉo traflugis kvazaŭ bruo de l' ondo super la malsatega popolamaso.

— Ĝi venas, venas!

Kaj la ŝipo malfruiĝis kelke da horoj. Multaj homoj kuris laŭlonge de la bordo, vokante:

— Benu vin Dio! Rapidu, rapidu!

Infanoj kantis, virinoj svingis per naztukoj, plorante. Al unu el ili naztuko ŝajnis tro malgranda, ŝi alportis tablotukon kaj per ĝi salutis la ŝipon.

Vere nenia ĝis nun ŝipo estis tiel adiaŭata kaj salutata.

De sur la ferdeko faris mallongan paroladon la kortuŝitaj reprezentantoj de la kooperativo. Unu el ili diris:

— Se vi ankaŭ bezonos helpon, memoru, fratoj, ke vi ĝin trovos ĉe ni.

Disdonado de la nutraĵoj daŭris ĝis la 10 vespere kaj por la sekvanta tago restis an-

kaŭ multe da laboro. Oni disdonis nutraĵojn preskaŭ al 20 mil homoj! Post kelke da tagoj la kooperativa pograndedejo sendis al Irlando duan ŝipon kun nutraĵoj kaj poste la trian.

Manchestera kooperativa pogranda magazeno festas en nuna jaro 50-jaran sian ekzistadon. Ĝi ne povus pli bele honori la jubileon, ol sendante ĉi tiujn miraklajn ŝipojn.

Laŭ pola kooperativa ĵurnalo „Spolem“ esperantigis J. Chankowski.

Scienco kaj vivo.

Ne kredinda... sed vera.

Jen superstiĉo, kiu bedaŭrinde ne malaperis ankoraŭ el kelkaj vilaĝoj de nia insulo (Malto).

Kiam infano malsaniĝas per pligrandigo de la lieno la patrino opinias ke iu malbona feino sorĉis la infanon, kaj ĝin anstataŭigis per alia malsana etulo—kaj anstataŭ konsulti kun kuracisto la malsanulo preferas apliki jen an rimedon, kies priskribon, mi elĉerpas el letero de okulatestanto, datumita la 16 an de Junio 1894-a.

La patrino kune kun du aliaj virinoj iras al marborda sablaro — prefere al golfeto de Sankta Juliano, kies statuo rigardas la golfeton kaj sub kies piedestalo fluas malvarma rivereto meze de amasiĝinta sablaro — la infanon ne tenas la patrino, sed unu el ŝiaj akompanantaj virinoj. Tien alveninte la patrino sin kaŝas en proksima loko kun celo ne vidi la farotan ceremonion; unu virino fosas kavon en sablo apud la piedestalo de la statuo, kaj dua virino senvestigas la infanon, ne nude sed sur lasinte nur ĉemizeton; poste, la virinoj enŝovas en la kavon la infanon ĝis la kolo. La etulo ekkrias, esploras kaj ekmoviĝas. La patrino ĉe tiuj kriadoj laŭte petas la virinojn, ke ili redonu al ŝi sian infanon — sed ili, trifoje sinsekve respondas: „Ĝi ne estas via infano“. Post tri minutoj en tiu malvarma ejo unu el la virinoj eltiras la infanon el la kavo, ĝin senvestigas tute nude, kaj ĝin vestas en varmigan tolajon, — dua virino enterigas la ĉemizeton en la sablan kavon. Ĉe tiu parto de la ceremonio oni alvokas la patrinon, kiu alproksimiĝas tenante naztukon sur la okuloj tial ke ŝi ne vidu la kavon, en kiun oni estis enmetinta la infanon.

La patrino, tenante la infanon sur la brakoj kaj montrante ĝin al la sanktulo lin alparolas jene:

„Sankta Juliano, jen la infano, kiun vi anstataŭigis. Ĉu vi decidis ĝin resanigi? Se

ne, mi lasos ĝin ĉe viaj pledoj, kaj vi ĝin prizorgu!“

Mi esperas ke ju pli baldaŭ venos tien civilizacio, des pli rapide malaperos tiaj duonsovaĝaj superstiĉoj.

D-ro Gust. Busuttie
el Malto.

Impresoj de la borso.

La borsistoj ne estas ĝentelmenoj. Kiel ĉi tiuj homoj aspektas dum la laboro, scias ĉiu, kiu vidis ian ajn pli grandan borson, ekzemple en la Vieno.

La turisto, deziranta vidi ĉi tiun spektaklon, suriras ŝtuparon kaj tra la komerca muzeo atingas la galerion. Proksimiĝante al la lasta pordo, li subite aŭdas ian neordinaran, nehoman krion. Kio ĝi estas? Ĉu tie oni mortigas sin reciproke, ĉu bankieroj luktas kun loĝantoj de afrikaj arbaregoj? Tiam krion oni aŭdis neniam kaj nenie. Estas en ĝi io tiel senharmonia, sovaĝa, ke ĝi teruras de malproksime.

Oni malfermas la pordon kaj staras sur la galerio. La okuloj ne havas sufiĉe da tempo por ĉirkaŭrigardi la grandegan salonon nudan malhelan, malpuran, ĉar tuj la tutan atenton kaptas la arego de homoj, kriegantaj mal-supre, aspektantaj kvazaŭ amaso da viglaj vermoj, kiuj manĝegas sin reciproke. Dum kelke da minutoj oni ne scias, kien oni eniris. Oni ne volas kredi, ke ĉi tio estas homoj kleraj, inteligentaj, oni kun timo rigardas la nigran amason sin kunpremanta kaj desaltanta, la formikaron, el kiu altiĝas sub la plafonon akra bruego.

— Nu, ĝi estas la aŭkcio — informas la servisto kun rideto de spertulo.

Vere! Kiam pasis la unua impresoj kaj la orelo al kutimiĝis al la bruoj, oni rimarkas meze de la formikaro iajn homojn kun libretoj. Momento da silento... unu el ili ion diras. Tuj ekkomencas subita tumulto. Kelkcent manoj levigas al la anoncanto, kelkcent borsistoj kriacas samtempe kaj tiel laŭte ke

vian haŭton trairas tremo kaj la gorgon premas kvazaŭ retenata ploro. La „riĉuloj“ sin interpuŝas, kaptas je la brakoj, saltas ĝis la okuloj. Iu pli malpacienca ŝiris sian libreton je pecetoj kaj jetis en vizaĝon de la vokanto. Ĉi tiu deskuis kaj krias plu.

Tiel do aspektas dancado ĉirkaŭ la ora idolo, tiel la diservo en la sanktejo de Mamono?

Oni eliras el la borso kun sento de profunda malĝojo, kun abomeno kaj konvinko, ke ne estas vero, ke sub la suno ekzistas nenio nova, ke ekzistas aferoj, kiujn ne antaŭsonĝas eĉ la plej riĉa fantazio, kiujn oni devas vidi per siaj propraj okuloj, aŭdi per siaj propraj oreloj por havi ĝustajn pri ili ideojn.

Estas en la bursa aŭkcio granda danĝerosento, larĝa konturo, sed la danĝerosento abomena, depuŝanta.

El T. Jeske-Choinski esperantigis

J. Chankowski.

2000 jarojn sub la akvo.

Laŭ opinioj de Luciano Zeŭxis kaj de Plinio konkludigis la arĥeologo Salomono Rejnau, ke post forkapto de Atheno Sullo forsendis en Romon (86 j. antaŭ la Kristnasko) la ŝargitan de devigaj donacoj, ŝiparon, kiu estis dronigita kontraŭ la Tunisa promontoro de Afriko.

Sed ankoraŭ en la 1907 jaro la grekaj kaptistoj de spongoj surpuŝis sin 5 kilometrojn

de l'bordo profunde 40 metrojn sur rompajojn de l'ligno kaj de marmorkolonoj, inter kiuj ili trovis ankaŭ la bronzan knabostatuon de mirindega antikv-greka laboro. De tiam ĝis la nuna tempo sub la observado de franca arĥeologo Merlin, la registaro faradis sisteme la eltiradon de tuta enhavo, estinta sur la nomita ŝipo. Tiu ĉi remŝipo havis 30 metr. da longeco kaj 8 metr. da larĝeco kaj ĝia ŝarĝo, kiu konsistis el la diversspecaj antikv-objektoj, egalas preskaŭ 400 tunojn. Inter alie la subakvistoj eltiris la diversajn partojn de l'marmor-monumento, kiuj, ŝajnas, devis aparteni al unu art-tutaĵo; tiu ĉi supozo pravigis efektive, ĉar el la rompajoj estis kunmetita tia sama grupo, kiu en tia sama ordo de dismeto de l'figuroj estas prezentita ankaŭ sur la glora, trovita ĉe disfosajoj en Romo, grandvazo de Borgeze, kiun oni povas vidi en Luvr muzeo.

Ĉiuj eltiritaj objektoj pruvis, ke ili apartenas al la plej bonaj ekzempleroj de greka arto, ĉar la trovita bronza Eros estas kopio de l' statuo de Praksitelo kaj la ornamoj de konstruaĵoj estas plene egalaj kun la elfositaj en Pompei. La ĉefŝarĝo de tiu sama ŝipo konsistis el 80 marmorkolonoj, tial nun post la fino de tiuj ĉi laboroj fariĝos klare, ke la prezo de l' malkovritaj artantikvaĵoj, kiuj ĉiuj plenigos la muzeon de Francujo, estas nealkulebla.

Esperantigis T. L.

El Esperanta Mondo.

Inter maristaro.

Esperanto konstante plidisvastiĝas inter angla maristaro. Oni sciigas, ke oficiroj de l' „Imprehnable“, fondis sur tiu ŝipo esperantistan grupon kaj tio esperigas, ke sur tiu ŝipo baldaŭ troviĝos oficiro kaj oficisto de senfadena telegrafo, kiuj scios esperanton.

Esperanto ĉe Vatikano.

La katolikaj esperantistoj, venintaj en Romon por partopreni sian kvaran internacian kongreson, estis akceptitaj de S. S. la Papo Pius X. dum solena aŭdienco 8-an de septembro. Ĉi tiu dato estas historia, ĉar unuafoje eksonis inter jarcentaj muroj de pontifika palaco harmoniaj sonoj de la lingvo internacia Esperanto. Akompanataj de muziko de pontifika gvardio, la kongresintoj entuziasme

kantis internacian katolikan himnon „Ni volas Dion“, kies vortoj estis tradukitaj en Esperanton.

Senpaga informoficejo.

La Federacio de la Bruselaj grupoj esperantistaj komunikas ke la „Senpaga informoficejo“ starigita sub la patronado de la komunuma administracio el Bruselo, kaj lokata 10, passage du Nord, — estas al la dispono de ĉiuj samideanoj kiuj vizitante la belan, interesplenan belgan ĉefurbon, — deziras iajn aajn informojn (adreso, de loĝejo, pensio, vidindaj, k. t. p.).

Partopreno de esperanto ĉe la mondekspozicio en Leipzig.

Dum la venonta jaro germana urbo Leipzig estos centro de esperanto-movado. Estas

sufiĉe sciate, ke tiu urbo posedas unu el la plej grandaj universitatoj de la tuta mondo, kaj pri la grandegaj mond-firmoj de la libro-industrio kaj eldonado oni aŭdas ĉiulande. En tia urbo, kiu pli ol alia partoprenas en la mondkomerco, kiu havas la plej diversajn internaciajn rilatojn, disvastigo de esperanto estas tre grava. En la bela publika legoĉambrego estas elmetitaj ĉiuj konataj esperantaj gazetoj. La oficisto havas devon, alporti ĉiun libron aŭ gazeton, kiun oni deziras. La uzado, eĉ la prunteprenado por kelkaj semajnoj, estas tute senpaga. La Reĝa Esperanta Biblioteko prezentas sekve vere idealan okazon, studi nian lingvon.

La jaro 1914 estos precipe grava por la esperanta movado en Leipzig. Jam nun oni preparas la internacian *mondekspozicion por libroindustrio kaj grafikaj artoj*. La plej multaj kulturaj nacioj de la tuta mondo partoprenos oficiale la ekspozicion. Ĉe „*strato de la popoloj*“ troviĝos apud la pavilonoj de diversaj nacioj ankaŭ *esperanta pavilono*, kiu enhavos ĉion, kio rilatas al nia movado, ekzemple la tutan esperantan literaturon, la kompletan gazetaron, prospektojn, katalogojn k. t. p. En speciala parto: „*Esperanto en la lernejoj*“, kie troviĝas skibajoj, tradukaĵoj kaj korespondaĵoj de esperantaj lernantoj oni ekkonas la praktikajn spertojn de la esperantaj instruistoj. Per bona, *certa statistika materialo* oni

intencas propagandi*). Plej kompleta jarlibro enhavos ĉiujn grupojn kaj esperantajn asociojn, kiuj respondos la skribajon sendotan de la Saksa Esperanto Instituto. La esperanto-pavilono en la mondekspozicio estos por nia movado efikega propagandilo, ĉar multaj miloj da vizitontoj per la rigardo devos konvinkiĝi, ke esperanto jam nun estas grava movado, kiun oni ne povas ignori. La esperanta popolo jam nun postulas sian lokon ĉe la „*strato de la popoloj*“.

Kelkaj aliaj partoj de la mondekspozicio uzas ankaŭ esperanton por siaj celoj, ekzemple la risorto por reklamafiŝoj. Per esperanto oni kolektas ĉiuspecajn reklamafiŝojn en diversaj landoj, kaj tiamaniere la praktika valoro de esperanto estas denove pruvata.

Pro la mondekspozicio ankaŭ la *Germana Esperanta Kongreso* okazos en ĉi tiu jaro en Leipzig. Sekve en la saksa urbo, kiu antaŭ cent jaroj estis la loko de grandegaj okazintaĵoj, esperanto ludos gravan rolon dum la jaro 1914*).

W. Hahn.

*) Specialaj mondkartoj videbligis disvastigon de Esperanto en tuta mondo.

*) La saksa Esperanto-Instituto, *Leipzig*, Dolzstrasse 1, tre ĝoje dankas ĉiujn samideanojn por la alendo de ĉiuspecaj reklamafiŝoj.

Bibliografio.

Mirinda Amo. Romano originale verkita en Esperanto de H. A. Luyken, F.B.E.A., aŭtoro de „*Paŭlo Debenham*“, rekomendita de la esperantista literatura Asocio. 1913. British Esperanto Association. London: Museum Station buildings 133 — 136, High Holborn, W. C. Paĝoj 296. Prezo 1 Sm. 250.

La aŭtoro de „*Paul Debenham*“, romano kiu havis grandan sukceson kaj estis tradukita en diversajn lingvojn, sed kiun ni bedaŭrinde ne konas, ĉar la rusa cenzuro ne donis al ĝi aptobon, verkis nun duan grandan rakonton, kiu same aplaŭde estas akceptata de la esperantistaro.

Ni legis ĝin kun granda plezuro, kvankam la aŭtoro tiel idealigas sian junan heroon, ĉirkaŭas lin per tiaj (kun unu escepto) angelkoraj personoj, kaj tiel direktas la okazintaĵojn al fina feliĉa solviĝo, ke li mem sentas tion, kaj fine mem konsentas, ke „tio similas

al feinrakonto kaj en tiuj ĉi prozaj tempoj tiaj aferoj okazas nur en mirrakontoj“.

Tamen malgraŭ kelka naiveco de l' rakonto, ĝi estas bela kaj enhavas tre interesajn paĝojn. Ekzemple la influoj de la religio kristana, de l' budismo kaj de l' ateismo sur la junulan koron kaj ilia interbatalado, ĝis kiam la dia providenco malkaŝas al ĝi la veraĵon, kaj redonas al la juna heroo la internan trankvilon, estas prezentitaj kun granda talento.

La plej bela ornamo de l' romano estas ĝia stilo. La lingvo fluas tiel korekte, bonstile, kaj ĝi estas tiel fleksiga, tiel esprimoriĉa, ke legante la romanon, oni ĝuas samtempe la belecon de Esperanto. Ni volonte konsentas kun la Esperantista Literatura Asocio ke la nova verko de s-ro Luykon meritas ĉiurilate varmegan rekomendon.

A. G.

Poezlaĵoj de Frideriko Schiller, tradukitaj de Kolonelo Zwach. N^o 1 Nova biblioteko Esperanto, aldonata de J. Glück kaj d-ro Sos. Wien. Verlag Paul Knepler (Wall'shaussersche Hofbuchhandlung I. Bauernmarkt N^o 15. Paĝoj 32. Prezo Sm. 0.250 (K. 0,60).

La nova biblioteko intencas publikigi perfektajn tradukaĵojn el la internacia klasika literaturo kaj originalajn verkojn en Esperanto. La unua volumeto enhavas en traduko de Kolonelo Zwach la mondfaman poezian verkon de Schiller „La kanto pri la sonorilo“, la du baladojn: „La grupoj de Ibikuso“, „La Ringo de Polikrateso“ kaj la poemon „La Divido de la Tero“.

Fari ĉiurilate bonan poezian tradukon estas tasko tre malfacila: vere titana laboro estas fidela kaj egalforma traduko de la senmorta Schillera Kanto pri sonorilo, kaŭze de ĝiaj tre artoplenaj versoj kaj de la diverseco de la lingvo germana kaj Esperanto, kiu lasta havas generale vortojn multe pli longajn ol la germana.

La tradukinton ne fortimigis tiuj malfaciloj. Li imitas fidele la silaban longecon de la versoj, la ritmon, la rimojn kaj montras talenton kaj multe da estetika sento en la transdonado de la sono de la versoj, kiuj konforme al la senco jen milde murmuretas jen bruas potence. Ni ekaŭskultu ekzemple kiel furiozas la fajrego en la urbeto:

Kvazaŭ el la forna truo
Ardas vento. Kia bruoj!
Fostoj falas, vitroj tremas,
Patroj vagas, filoj ĝemas,
Krias bestoj
Sub la restoj
Ĉio flugas kuras, savas
Nokto tagan lumon havas.

Oni eble riproĉos al la tradukinto, ke konservante tiel fidele la formon, li ne sukcesis en ĉiu aparta verso transdoni same fidele la senco t. e. traduki ĉie preskaŭ laŭvorte.

Sed tion ne sukcesas ĉiam eĉ plej geniaj poetoj, tradukante reciproke siajn verkojn. Ni kontentiĝu, ke la ĝenerala impreso estas bonega, pruvante la talenton de l' tradukinto kaj la flekseblecon de Esperanto. Ni legis la tradukojn de s-ro Zwach kun granda plezuro kaj gratulas lin pro lia verko, kiu bonege rekomendas la „Novan bibliotekon“.

Esperanta nomenklature de Kemio kaj vortaro de kemio kompletigita kaj korektita eltiraĵo el Scienca Gazeto. Eldonejo: Internacia Scienca Asocio Esperantista 51 Rue de Clichy. Paris 1913. Paĝ. 14. Prezo 0,50 fr. (0,200 Sm.)

La ĥemia nomenklature prilaborita de kompetentuloj estas grava akiro por nia scienca lingvo esperanta, kaj la donitaj en la verketo nomoj de la korpoj simplaj, iliaj diversaj kombinoj, de ĥemiaĵoj k. t. p. definitive pliriĉigas nian lingvon kiel ne kritikeblaj, ĉar ili estas jam internaciaj en ĉiuj plej gravaj lingvoj europaj.

La aŭtoroj lerte evitis la tendencon reformi la ekzistantajn nomojn internaciajn, kiun rifon ekzemple ne evitis en sia projekto prof. Ostwald.

Unu escepton formas la nomoj de acidoj (ekz. anstataŭ acido sulfurika—sulfata acido), sed eĉ en tiu novaĵo la senco estas facile divenbla al ĉiu ĥemiisto, kiu antaŭe ne havis okazon studi la proponon de nia Internacia Scienca Asocio.

Esperantista Kantaro. Tekstaro. Dua eldono reviziita kaj pligrandigita. 6-a—10^o miloj. Germana Esperanto - Librejo. Leipzig 1913. Paĝoj 72. Prezo M. 0.50 (Sm. 0.250).

„Ekloĝu kie kantoj sonas; malbonuloj ilin ja ne konas“. Tiu-ĉi sentenco tre bone atestas pri nia esperanta popolo, ĉar ĝi estas vere kantema. Ekzistas jam multe da diversaj kantaroj, kaj la „Esperantista Kantaro“ kunmetita de Wilhelm Fries aperas en dua eldono.

Ĝi enhavas kolekton de bonkonataj germanaj popolkantoj kun aldono de diversnaciaj popolkantoj kaj originalaj kantoj esperantigitaj de s-oj Meier, Zamenhof, Pfeil, Bicknell, s-no Ŝefer kaj aliaj. La nomoj de la kunverkintoj jam bone atestas pri la tradukoj, kiuj estas plejgrandaparte senriproĉaj.

Sed ni devas fari riproĉon al la redaktinto, ke li toleris kelkloke deflankiĝojn de la esperanta fundamenta gramatiko, ekzemple:

Li aĉetis altan silkĉapel' (p. 57)

Kie aldos ĝin neni' (p. 60).

Turmento tro krue' (. 58)

Sed tiu-ĉi mokridis laŭt' (p. 58)

Ni opinias ke gramatikeco de stilo estas nepre kondiĉo de bona poeziaĵo. La kantetojn oni lernas ja parkere. Kial do alkiŝi la kantantojn al eraraj esprimoj?

== ABONU ==
Amerikan Esperantiston

WASHINGTON, D. C., USONO.

La sola Esp. gazeto en Usono, kaj unu el la plej bonaj en la Esp. mondo. Redaktita en Esp. kaj angla
Jaro: Sm. 2.50; unu ekzemplero, Sm. 0.20.
Abonebla pere de nia Administracio.

German-Aŭstria Esperantisto

Wien, I, Tuchlauben, 18.

Oficiala organo de la „Ligo de germanlingvaj esperantistaj grupoj en Aŭstrio“, kaj „Provinca Ligo de germanaj Esperantistoj en Bohemio“.

Jara abono: Sm. 1.50.

Brazila Esperantisto

Oficiala monata organo de „Brazila Ligo Esperantista“

Redakcio—Avenida Rio Branco, 153—2.—Rio de Janeiro, *Brazil*.
Jarabono: Eksterlanden: 2 Sm.

Ĉiu ukraina esperantisto nepre devas aboni la solan esperantan organon en la Ukrainujo.

UKRAINA STELO

monata, riĉe ilustrata, 16-paĝa literatura, informa kaj propaganda jurnalo. Jara abono: en Aŭstrio 3 K. Eksterlanden 1 Sm. 4000 S. Specimeno kontraŭ respondkuponon. Redakcio: *O. Kuzma, Kolomea, 360 Nova, Aŭstrio-Galicio*.

B. K O T Z I N

Historio kaj teorio de Ido
„Esperanto kripligita“

Kun antaŭparolo de R. Brandt, profesoro - lingvisto de Moskva Universitato.

Vii - 144 paĝoj

Prezo 50 kop. (Sm. 0,53)

Afr. 58 kop. (aŭ ses respondkuponoj)

Aĉetebla ĉe Administracio de Pola Esperantisto
D-ro Zamenhof skribis al la aŭtoro: „Vian libron *Historio kaj teorio de Ido* mi legis kun intereso. La diligente dokumentita libro estas verkita tre bone kaj sendube estos tre utila

Ĉiu vera esperantisto devas koni la libron

Historio de Esperanto

1887 — 1912 j.

D E Z. A D A M

(Adam Zakrzewski)

La verko premiita en la literaturaj konkursoj de VII Antverpena Kongreso

La prezo 0.80 Sm., Kun. trasenso rekom. 0.95 Sm

Ricevebla en Administracio de Pola Esperantisto.

Kuracisto

Internacia Medicina Monata Revuo. Unika Kuracista Gazeto Tute en Esperanto. Ĉiumonate Oficialaj Komunikaĵoj de la T. E. K. A.

Jarabono: Sm 3. Por T. E. K. A.—anoj—senpage.

Adreso de la Redakcio kaj Administracio:

Varsovio, str. Szopena № 1, Redaktoro: *D-ro Ludwik Chybczyński*.

Germana Esperantisto

Duonmonata gazeto por la disvastigo de la lingvo Esperanto

Oficiala organo de Germana Esperanto-Asocio

Eldono A, eliranta la 5an de ĉiu monato, celas la propagandon de Esperanto kaj enhavas tiurilatajn artikolojn en germana lingvo kaj en Esperanto.

Eldono B eliras la 20an de ĉiu monato kaj estas pure literatura. Ĝi enhavas ilustraĵojn, konkursojn ktp. kaj estas redaktata nur en Esperanto.

Jara abonprezo por ĉiuj landoj po eldono Sm. 1,200 (Mk. 2,40).

Postulu nian plenan katalogon!

Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag

Dresden—A. 1, Struvestr. 40.

Kataluna Esperantisto.

Ĉiumonata gazeto, organo de la „Kataluna Esperantista Federacio.“

(50 societoj—pli ol 500 individuaj membroj.)

Sek. de Red.: Joseph Grau. Redaktoro: Fred. Pujolà Kotizajo 4. fr. (1.600 Sm.)

Adreso: str. Gracia 12, *Sabadell-Katalunujo*.

Esperantista Poskalendaro 1914

La praktika, de ĉiu esperantisto ŝatata poŝlibro reaperis!

Tre interesa enhavo; inter aliaj: artikolo pri kalendarara reformo, listoj de esperantistaj grupoj kaj de la gazetaro, speciala rubriko por kolektantoj ktp.

La libreto estas vera trezoro por ĉiu propagandisto kaj kolektanto

Prezo: Sm. 0,400 (Mk. 0,180) sendkosto eksterlanden Sm. 0,100

Ader & Borel G. m. b. H., Esperanto-Verlag

DRESDEN—A. 1, STRUVESTR. 40

The British Esperantist

VIII-a jaro. — Mondkonata pro sia pura stilo en literaturo! Aperas ĉiumonate!

Speciale redaktita fako pri Tutmonda Kroniko
Jarabono: Fr. 4 (1,50 Sm.).

Adreso:

Museum Station Buildings 133—136, High Holborn, London.

OFICIALA

Gazeto - Esperantista

Organo de la Lingva Komitato, de la Konstanta komitato de la Kongresoj kaj de la Internacia Konsilantaro
Unu numero Sm. 0.200. Jara abono: Sm. 2.—

Redaklejo kaj Administrejo: 51, rue de Clichy, Paris

„LA ONDO DE ESPERANTO.“

MONATA ILLUSTRATA REVUO

(fondita en la jaro 1909).

Ĉiu abonato de la j. 1914,

krom 12 n-roj de l'gazeto, — ricevos donace belan Esper. libron:

Esperanta Poŝkalendaro por la jaro 1915.

„La Ondo“ aperas akurate la 1-an daton, novstila. Ĉiu n-ro havas 16--24 paĝ. Formato 17x26 Bela kovrilo

Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Nia lanterno (kontraŭ ido). Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr).

Anonco en „Koresp. Fako“—3 respondkuponoj

La abonpagon (2 rubl=2, 120 sm). oni sendu al librejo „Esperanto“ (Moskvo Lubjanskij proezd, 3, Ruelando) aŭ al Administracio de Pola Esperantisto.

Scienca Gazeto.

Internacia monata revuo pri scienco kaj industrio

Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperancista.

Jarabono — 3 Sm.

Eldonejo: Hachette & K^o, 79, Boulevard St.-Germain, Paris.

Riceveblaj en Administracio de Pola Esperantisto:

„Antaŭen kun Kredo!“

Literatura Jarlibro de „P. E.“ por 1911 jaro.

La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: por abonantoj de „P. E.“ 0,50 Sm. „ne-abonantoj 1,00 Sm.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo, verkita en perfekta Esperanto devas troviĝi en biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.

SI, LA TRIA

Belega novelo de Henryk Sienkiewicz, tradukita de Antoni Grabowski

La prezo 50 kop.

LINGVO INTERNACIA

(fondita en jaro 1895)

Centra organo de la Esperantistoj, eliranta post la 15-de ĉiu monato.
Ĉiunumere 48 paĝoj. Formato 13 1/2 x 20 1/2 cm.;
Jara abono: 5 fr. (Sm 2).

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, rue Lecépède, Paris (Francujo).

La unua revuo Esperantista por la junularo

JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto ilustrata

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj.
En „Juna Esperantisto“ troviĝas: diversaj rakontoj kaj noveloj por la junularo, fabeloj, poemoj, lingvaj ekzercoj, amuzajoj, problemoj, k. t. p.

La jaran abonon: 3 fr. (1,20 Sm) sendu al
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO.

33, rue Lecépède, Paris (Francujo).

Farine Lactée Nestle

Nestle'a Infan-Faruno

enhavas plej bonegan svisan lakton.

LA NEĜO

Kvarakta dramo de St. Przybyszewski
(Pŝibyŝevski) trad. T. Ficovski.

La prezo 50 kop.

„Pekoj de l' Infaneco“

bela novelo de Bolesław Prus,
tradukita de Antoni Grabowski

Prezo 35 k., por abonantoj de „Pola Esper.“ 20 k.